DIA REGNO
ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 5 (896) • 2012 •



Papirtondaĵo farita de la nepino de Hsu Chungmu, Ĉinio

**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
✆ +420 325 615 651; 💻 polnicky@quick.cz

**Kasisto**: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## ENHAVO

| | |
|---|---|
| Pri perloj kaj porkoj | 99 |
| Prediko dum la kongreso | 103 |
| Raporto de la 62-a KELI kongreso | 105 |
| Aliĝilo por sekvontjara kongreso | 109 |
| Protokolo de la jarkunveno de KELI 2012 | 112 |
| La ekzisto de DIA REGNO | 114 |
| Flo Martorell ricevas FAME-premion | 118 |
| Rememore al Olavi Kantele | 117 |
| Rememore al Donald Broadribb | 118 |
| Rememore al Nel van Iperen | 119 |
| Matena preĝo | 120 |

## REDAKTORAJ VORTOJ

Ĉi-numere vi trovas raporton kaj bildojn pri la somera KELI kongreso en Germanio. Mi kaj mia familio partoprenis kaj ĝuis la kunestadon kaj la etoson. Mi bedaŭras ke mi ne povas enmeti pli da bildoj pro manko de spaco. En sekvaj numeroj mi, kiel kutime, publikigos kelkajn prelegojn kaj pli da bildoj. Vi kiu partoprenis kaj fotis dum la kongreso, vi daŭre povas sendi al mi bildojn kaj espereble vi vidos ilin iam en la gazeto.

Dum la jarkunveno ni parolis kaj esperis pri ekumena kongreso sekvontjare en Italio, sed beaŭrinde tiu plano ne realiĝos. Anstataŭ vi trovos en tiu ĉi numero de Dia Regno inviton al Svitavy, Ĉeĥio.

Pro teknikaj kauzoj ĉe la presejo la antaŭa numero malfruis. La nuna numero ankaŭ iom malfruas ĉar ni devis atendi la lastajn informojn pri la sekvontjara kongreso por ke ni povu enmeti la inviton. Mi esperas je via kompreno.

# Pri Perloj kaj Porkoj

## Prelego dum KELI-kongreso 2012

Gerhard HOFMANN, DE

*Ne ĵetu la perlojn antaŭ la porkojn*

Mateo 7,6

En la sepa ĉapitro de la Evangelio laŭ Mateo Jesuo donis al siaj disĉiploj la ordonon. *"Ne ĵetu la perlojn antaŭ la porkojn."*

La temo de nia renkontiĝo ja estis "Kaŝitaj Trezoroj". Ĉu eblas, ke eĉ en la du terminoj "perloj kaj porkoj" ni povas trovi kaŝitajn trezorojn? Perloj ofte estas tre valoraj, kelkfoje ili estas uzataj kiel simbolo por io tre ŝatata kaj estimata. Kelkaj viroj eĉ nomas siajn edzinojn perloj.

Sed kiu rilato estas inter porko kaj trezoro? Ĉu la porkoj ne estas simbolo por malpureco kaj senmoraleco? Ĉu la porkoj ne estas preskaŭ la malo de perloj? La ordono "Ne ĵetu la perlojn antaŭ la porkojn" estas ja parabolo, kaj kiel ĉiu parabolo ankaŭ ĉi tiu bezonas interpretadon, por ke oni komprenu ĝin bone kaj korekte.

Kiam mi havis dek, dek unu jarojn, mi aŭdis konatan historieton, kiu traktas pri kaŝita trezoro: Estis patro, kiu sur la mortolito diris al siaj tri filoj, ke en la granda kampo, kiun ili nun heredos, estas kaŝita tre valora trezoro. Post la morto de la patro la tri fratoj komencis serĉi la trezoron. Ili fosis kaj fosis, sed ne povis trovi la promesitan trezoron. Sed ili ne ĉesis serĉi la trezoron kaj iom post iom ili fariĝis tre riĉaj terkultivistoj, ĉar pro la ĉiama fosado la kampogrundo fariĝis pli kaj pli fruktodona. Nur post multaj jaroj ili komprenis, pri kio vere parolis ilia patro kaj ili ridis kaj estis plenaj de ĝojo kaj danko pro la bona konsilo de la mortinto.

Por ni kristanoj la Biblio estas tiu kampo. En la Evangelio laŭ Johano, ĉapitro 5, versiklo 39, Jesuo diras: *"Vi esploras la Skribojn, ĉar vi opinias, ke en ili vi havas eternan vivon. Kaj ili estas tio, kio atestas pri mi."*

Laŭ mia sperto povas okazi, ke oni pensas, ke la signifo de ia teksto estas klara kaj komprenebla, sed poste (tre ofte nur post multaj jaroj) oni devas



lerni kaj kompreni, ke la ĝisnuna interpretado ne estas ĝusta kaj pro tio ne estas konforma kun aliaj bibliaj tekstoj.

Ni nun pripensu pri la du terminoj, kiujn Jesuo uzis: Perloj kaj porkoj. Se ni aŭdas pri porkoj, ni eble rememoras pri la fakto, ke en la Malnova Testamento Dio malpermesis la manĝadon de porkaĵo. Aŭ ni rememoras pri la historio, ke Jesuo permesis al demonoj eniri en porkojn, aŭ ni rememoras pri la parabolo de Jesuo, en kiu juna filo fariĝis paŝtisto de porkoj, kiam li ne plu havis ion de la heredaĵo de sia patro.

Diotimaj judoj ĝis hodiaŭ sin detenas de porkaĵo. Kaj ankaŭ la anoj de la islama religio havas la saman kutimon. Eĉ inter la kristanoj ekzistas malgrandaj grupoj, kiuj sin ankaŭ detenas de la manĝado de la tielnomataj malpuraj bestoj. La riproĉo, ke tiuj kristanoj volas gajni per tia sindeteno la favoron de Dio kaj ke tio estas kvazaŭ enirbileto por la ĉielo estas miaopinie stultaĵo, ĉar kristanoj scias, ke eternan vivon ili dankas nur al la morto de Jesuo Kristo je la kruco.

Laŭ la Sankta Biblio ĉiu homo egale bezonas la gracon, la korfavoron kaj la pardonemon de Dio. Ne estas eĉ unu escepto. Do, la observado de iaj ordonoj, la celebrado de iaj ritoj, la senfina ripetado de la Patro Nia aŭ de la Ave Maria, la partoprenado al mesoj, la pilgrimado al tielnomataj sanktaj lokoj, la fastado kaj multaj aliaj aferoj ne povas helpi nin fariĝi pli agrablaj en la okuloj de Dio. Nur la fido al la sango de nia savanto Jesuo validas.

Sed Jesuo diris ankaŭ en la Evangelio laŭ Johano, ĉapitro 14, versiklo 23: Se iu min amas, tiu observos mian vorton. Kaj pro tio, kristanoj ĉiam klopodas esti obeemaj al la leĝoj. Sed bedaŭrinde ne estas ĉiam facile, decidi, ĉu iaj ordonoj skribitaj en la Biblio havas signifon ĝis hodiaŭ aŭ ne.

Ni ja ne ĉiam havas tiel klaran ateston kiel ekzemple ĉe la demando pri la cirkumcido. Eble ni komprenas, ke la leĝoj pri la oferado certe ankaŭ ne plu validas, ĉar ili estis por la popolo Izrael kaj por ciuj homoj nur montriloj al Jesuo. Se vi atingis la destinon, ĉiuj vojmontriloj, kiuj helpis vin trovi la vojon al tiu loko, ne plu havas signifon. Dio montris tiun fakton en la momento de la morto de Jesuo, kiam la kurteno en la templo disŝiriĝis. De tiu momento, kiam mortis la vera oferŝafido, la morto de la simboloj ne plu havas ian sencon.

Por katolikaj kristanoj la decido eble estas pli facila ol por la luteranoj. Ĉar katolikoj povas apogi sin al du fundamentoj: Kaj al la Sankta Biblio kaj al la tradicio. Tradicio inkludas ĉion, kion koncerne al kredoinstruo diris koncilioj aŭ papoj aŭ la tielnomataj eklezíaj patroj. Sed la evangeliaj kristanoj devas decidi nur per la helpo de la Biblio, ĉar laŭ la reformacia principo: “Sola skriptura” la respondon al ĉiu demando oni devas trovi en la Biblio.

Do, koncerne al la distingo de puraj kaj malpuraj bestoj katoliko povus diri: La tradicio instruas nin, ke tiu leĝo ne plu validas por kristanoj. Sed protestanto devus diligente traserĉi diversajn tekstojn por trovi pravigon por la kutimo manĝi la viandon de malpuraj bestoj. Eble ili ĝojas ke ili trovas tekstojn, kiuj ŝajne donas la deziratan rezulton.

Ekzemple: En unu teksto Jesuo diris: Kio eniras en la buŝon, ne malpurigas homon. En alia teksto Paŭlo diris: Vi povas manĝi viandon kun bona konscio. Kaj en la libro Agoj, Dio mem diris al Petro en vizio: Buĉu kaj manĝu la malpurajn bestojn.

Iomete pli profunda studado de la menciitaj tekstoj el la Nova Testamento tamen montras, ke la tekstoj tute ne temas pri puraj kaj malpuraj bestoj. En la diskuto kun Jesuo temis pri la lavado de la manoj kaj Paŭlo parolis pri viando, kion aliaj dediĉis al iaj dioj kaj poste ofertis tiun saman viandon en la bazaro. Kaj Petro povis diri nelonge post sia vizio: Nun mi komprenas, kion Dio volis diri al mi. Kaj tio estis: Ne rigardu aliajn homojn kiel malpurajn homojn. Laŭ mia opinio Dio tute ne donis al Petro kaj al la estonta kristanaro per tiu vizio la permeson ekde nun manĝi porkaĵon.

Multe da homoj pensas, ke la distingo inter puraj kaj malpuraj bestoj estas demando pri la sano. Do, la viando de malpura besto kvazaŭ estus malsana. Kelkfoje eble tio povas esti, sed mi ne kredas ke tio estas la ĉefa motivo por tiu stranga leĝo. Tiu leĝo ne estis donita nur per Moseo al la Izraelidoj, sed pli frue Dio donis tiun leĝon al la homaro. Eĉ Noa jam konis la distingon inter puraj kaj malpuraj bestoj.

Dum la lastaj 50 jaroj mi venis al la konvinko, ke malantaŭ tiu leĝo ni povas trovi kaŝitan trezoron, kiun Dio ofertas al la tuta homaro por helpi al la homoj solvi la grandan problemon de malsato en la mondo.

En jam menciita parabolo Jesuo donis al la aŭskultantoj kaŝitan profetaĵon. La juna filo fariĝis paŝtisto de porkoj. Kaj li malsatis kaj deziris manĝi tion, kion oni donis al la porkoj, sed oni ne permesis al li preni ion el la staltrogo.

Kaj nun pripensu la hodiaŭan situacion en la mondo. Milionoj da homoj malsatas kaj ofte eĉ mortas pro malsato. Kaj en la sama tempo ĉiujare milionoj da tunoj da tritiko, maizo, terpomoj, lakto kaj sekigitaj fiŝoj kaj aliaj, kiuj estas bonaj kiel nutraĵo por homoj, oni metas en la staltrogojn de porkoj. Porkoj kiel ĉiomanĝuloj estas nutraĵkonkurantoj de homoj kontraste al bovoj, ŝafoj, kaproj kaj aliaj, kiuj estas remaĉuloj. Se la homaro komprenus la signifon de tiu Dia ordono kaj agus laŭ tiu ĉi konsilo, ne plu estus malsato en la mondo.

Do, nun sufiĉas paroli pri porkoj kaj porkaĵo. Ni turnu nin al la dua esprimo, al la perloj. Kiun signifon havas la perloj en la parabolo de Jesuo? Dum la pasintaj monatoj mi demandis kelkajn kristanojn pri la signifo de la ordono: Ne ĵetu perlojn antaŭ la porkojn. Kaj la respondo ĉiam estis la sama. Perloj, tio estas Jesuo, kaj la bona mesaĝo pri nia savo, perloj estas la instruo de nia kredo, la elaĉeto el niaj pekoj, perlo estas la Biblio, kaj tiel plu. Ne portu tiujn sanktaĵojn al homoj, kiuj ne estimas la Evangelion pri nia savo, kiuj ridas kaj mokas pri Dio kaj pri la Sankta Skribo kaj pri nia kredo.

Mi legis ankaŭ predikojn pri tiu vorto de Jesuo kaj mi devis konstati ĉiam la saman interpretadon de la teksto. Kaj mi devas konfesi, ke ankaŭ mi mem dum ĉirkaŭ 50 jaroj komprenis tiun tekston tiamaniere. Mi havas du germanajn tradukojn de la teksto kun

klarigoj (Albrecht kaj Bruns) kaj ankaŭ ili diras, ke ne estas bone misii, se la homoj ne estas pretaj akcepti la mesaĝon. Tiuj homoj ne estas indaj ricevi la bonan mesaĝon de Dio.

Jam en tre fruaj kristanaj skriboj oni trovas tiun interpretadon. Hundoj kaj porkoj estas sinonimoj por la nekredantoj, la herezuloj, la apostatoj, la kontraŭuloj de la eklezio kaj Jesuo per tiu vorto volis diri, ke la disĉiploj ne permesu, ke nebaptitaj partoprenu al celebrado de la Sankta Manĝo.

En interreta diskutrondo pri tiu teksto mi legis la kontribuon de unu partoprenanto. Li skribis: Tiu vorto de la Biblio montras klare la grandan arogantecon de la kristanoj kontraŭ la ateistoj. Kiam mi legis tion, mi pensis, ke li pravas, ĉar estas aroganteco nomi aliajn homojn hundoj kaj porkoj. Do, li pravas, se ni restas ĉe tiu ĉi interpretado.

Sed se ni studas tiun vorton de Jesuo el la kunteksto, ni tuj rimarkas, ke tiu dumiljara interpretado tute ne respegulas la sencon de la vorto de nia Sinjoro. Ĉar la antaŭaj versikloj parolas pri la juĝado pri aliaj homoj. Jesuo ne permesas, ke homoj kondamnu aliajn homojn. Sed rigardi aliajn homojn kiel porkojn, tio ja estas kondamno kaj juĝo kaj se ni ĉesas prediki la Evangelion al aliaj, ĉar ili laŭ nia opinio ne estas indaj aŭdi la mesaĝon, ni agas kontraŭ Dio. Ĉar Dio pagis por ili multon.

En parabolo pri la komercisto Dio fordonis ĉion por atingi la tre ŝatatan perlon. Mi komprenas tion tre klare, sen ia dubo: La perlo estas la homaro.

Certe al ni ĉiuj la teksto, la tielnomata ora teksto, estas bone konata, ke Dio tiel amis la mondon, ke li donis Sian Filon por la savo de la homo. Kaj Paŭlo skribis al Timoteo, ke Dio volas, ke ĉiuj homoj estu savitaj kaj venu al la scio de la vero. Se ni akceptas la interpretadon, ke la perloj kaj la sanktaĵo en la parolado de Jesuo estas ni kaj niaj kunhomoj, ni subite rimarkas, ke malaperas la multaj malharmonioj kun aliaj Bibliaj tekstoj kaj subite ankaŭ estas solvita la enigmo koncerne la kunteksto.

Kaj la lasta ordono de Jesuo al la disĉiploj, ke ili prediku mondvaste la bonan mesaĝon, subite aperas en nova lumo. Ĉu nova ekkono ne estas kiel eltrovo de kaŝita trezoro? Mi pensas, ke estas granda tragedio, ke la kristanoj dum du mil jaroj miskomprenis la vorton de Jesuo “Ne ĵetu la perlojn antaŭ la porkojn” , ĉar ili ekzakte tion faris, kiam ili fiere diras: Mi neniam ĵetis perlojn antaŭ porkojn. Tio min rememorigas al vorto de Paŭlo: Tion, kion mi volas, mi ne faras, sed tion, kion mi ne volas, mi faras.

Dio pardonu al ni, ke ni ofte miskomprenas Liajn ordonojn kaj pro tio ankaŭ malobeas al ili. Admono al vi, karaj aŭskultantoj: Ekde nun neniam plu uzu la vorton de Jesuo pri la perloj kaj la porkoj en maljusta senco, ĉar la perloj estas la homoj, kiujn ni ofte permesas fali, pri kiuj ni rapide rezignas, kiujn ni ofte malestimas kaj pri kiuj ni pensas, ke ili ne estas indaj ricevi la amon kaj gracon de Dio kaj ke ili ne estas indaj ricevi la eternan vivon.

Jesuo priskribis sian taskon sur la tero per la vortoj: Mi venis por serĉi kaj savi tion, kio estas perdita. Ĉu ni kristanoj ne havas la saman taskon ?

# Esperantokongreso 2012 en Zöblitz

## Prediko dum dulingva diservo en Zöblitz

Wolfram ROHLOFF, DE


*... por ke ili sciu la misteron de Dio, Kriston, en kiu estas kaŝitaj ĉiuj trezoroj de saĝeco kaj scio. Tion mi diras, por ke neniu vin trompu per parola allogeco.*

Kol 2, 2-4

*Graco estu kun vi de Dio, nia patro, kaj de Jesuo Kristo, nia sinjoro. Amen.*

Karaj gefratoj en Kristo, la temo de 62a kongreso estis "kaŝitaj trezoroj". Kaj dum nia tuttaga ekskurso al Seiffen mi rakontis al vi pri kaŝita trezoro, kiun oni serĉas en nia regiono: la "sukcena ĉambro". En la jaro 1716 la prusa reĝo Friedrich Wilhelm I donacis al la rusa caro Petro la Granda per sukceno ornamitan salonon por la Katarina-Palaco apud Sankt Peterburgo.

Dum pli ol 2 jarcentoj la sukcena ĉambro restis en la Katarina Palaco, sed dum la dua mondmilito germanaj soldatoj ĝin konfiskis kaj transportis al Germanio. Sed ĉi tie perdiĝis la ŝpuroj. Kelkaj opinias, ke la sukcena ĉambro dum bombardado en Dresdeno forbrulis, aliaj, ke ĝi estis kaŝita en sekreta loko, eble en malnova minejo apud Seiffen en la ercmontaro.



Sed kaŝita, ne plu konata trezoro estas senutila. Eble ja sukcena ĉambro vere estis kaŝita apud Seiffen, sed tiom longe, kiom ni ne scias kie, tiom longe ĝi restas senutila, senvalora, kaŝita trezoro kaj nur taŭgas por allogi turistojn. Aŭ kiel diras proverbo el la apokrifa libro de Jezuo Siraĥ en la 20a ĉapitro:

*Saĝeco kaŝita kaj nevidebla trezoro:*
*kiu utilo estas en ambaŭ?*

Siraĥido 20, 30

Kaj la respondo al tiu retorika demando estus: neniu!

Paŭlo en sia letero al la Kolosanoj skribas en la dua ĉapitro:

*"... (por ke ili) sciu la misteron de Dio, Kriston, en kiu estas kaŝitaj ĉiuj trezoroj de saĝeco kaj scio. Tion mi diras, por ke neniu vin trompu per parola allogeco."*

En Kristo do estas kaŝitaj ĉiuj trezoroj

de saĝeco kaj scio. Sed fakte por multaj homoj tiu trezoro estas kaŝita kaj ne videblas. Kial?

Se vi rigardas al Kristo, al lia vivo kaj al lia morto, kion vi vidos? Vi ne vidos heroon, sed vi vidos krucumitan, torturitan homon, kiu kruele mortis sur kruco. Sed tamen ni Kristanoj opinias: jen la filo de Dio, jen la Mesio, la Kristo, nia savanto, kiu elaĉetis nin de peko kaj morto.

Ĉu tio ne estas stranga kredo? Ke Dio, ke Kristo mortis, ke li eĉ mortis sur kruco, tiu bazo kaj fundamento de nia kristana kredo, tio estas la ĉefa kaŭzo, kial nia trezoro restas kaŝita por multaj. Lastjare mi ekzemple interparolis kun islama taksistiristo. Dum veturado li demandis min pri mia religio. Mi rakontis al li, ke mi estas kristano, pastoro. Subite li havis multajn demandojn pri la kristana kredo, speciale li esprimis sian miron, ke Jesuo mortis sur kruco. Ĉu kredi, li diris, ĉu kredi, ke filo de Dio, ke Dio mem mortis sur kruco, ĉu tio ne estas frenezo?

Mi provis respondi tiel: Jes, vi pravas. Tiel freneze amas nin Dio, ke li eĉ mortas por ni, mortas, por ke la morto ne plu estu fino kaj danĝero por ni, sed vojo al li.

La penso, ke la kruco de Jesuo por ni estas esprimo, signo aŭ eĉ pruvo de la Dia amo, tio estis tute nova por li, estis por li ankoraŭ kaŝita trezoro. Ĉu li intertempe malkovris la trezoran misteron? Mi ne scias.

Paŭlo ja akcentas, ke la mistero de Dio estas Kristo. Kion li volas diri per tiu frazo? Unue ne intermiksu la du vortojn mistero kaj enigmo. Se vi solvis enigmon, la enigmo por vi ne plu estas enigmo, ĉar vi ja scias la solvon kaj komprenas ĝin. Sed mistero restas mistero, eĉ se ĝi estas malkaŝita. Kaj la mistero de nia kredo estas: En Jesuo Kristo la ĉiopova Dio venis al ni, eĉ mortis por ni, por ke ni vivu kaj konfidu lian grandan amon.

> *“en Kristo estas kaŝitaj ĉiuj trezoroj de saĝeco kaj scio.”*
>
> Kol 2, 3

Do se vi volas esti saĝa, se vi volas scii ion pri Dio, kia li estas, tiam rigardu al Jesu Kristo: *“en kiu estas kaŝitaj ĉiuj trezoroj de saĝeco kaj scio”*

Por multaj, kiuj ankoraŭ ne malkovris tiun ĉi trezoron, eble ŝajnas stulta afero, kredi kaj konfidi al krucumita Dio. Sed por ni tiu mistero estas tiu trezoro, kiun Dio donacis al ni, por nin riĉigi en vivo kaj morto.

> *“... (por ke ili) sciu la misteron de Dio, Kriston, en kiu estas kaŝitaj ĉiuj trezoroj de saĝeco kaj scio. Tion mi diras, por ke neniu vin trompu per parola allogeco.*”

Fine Paŭlo petas, ke ni ne lasu nin forlogi de Kristo. Eble aliaj ideoj aŭ religioj ŝajnas pli saĝaj. Eble aliaj homoj povas pli lerte paroli pri sia religio aŭ mondkoncepto, eble ili havas ŝajne pli saĝan kredon aŭ teorion pri Dio, vivo kaj homaro. Sed ne lasu vin trompi per ilia parola allogeco. Restu en Kristo, kiu estas la mistero de Dio.

Ĉar en li sola

> *“... estas kaŝitaj ĉiuj trezoroj de saĝeco kaj scio.*”

*Kaj la paco de Dio, kiu superas ĉian intelekton, gardu viajn korojn kaj pensojn en Kristo Jesuo, nia Sinjoro. Amen.*

# Raporto de la 62-a KELI Kongreso – Kaŝitaj Trezoroj

29.07.2012 ĝis 4.08.2012 en Zöblitz, Germanio

Els van Dijk, NL

La luterana pastoro de Zöblitz, Wolfram Rohloff, invitis al sia urbeto la ĉi-jaran KELI Kongreson. Zöblitz situas proksime al la landlimo kun Ĉeĥio en la orientgermana Ercmontaro , kies nomo originas en la 11-a jarcento. Tiam komenciĝis la elfosado de ercoj. Finfine elĉerpiĝis inter alie la arĝentminejoj. Nuntempe la malgrandskala ligno-industrio allogas la turistojn kaj la idiliaj vilaĝoj, deklivaj pejzaĝoj kovritaj de arbaroj.

Nia konstruaĵo por kunvenoj kaj loĝado, la kristana kongrescentro Hüttstatmühle, gastigis 54 partoprenantojn el 11 nacioj. La kongresa temo "Kaŝitaj Trezoroj" estis elektita pro la rilato de bibliaj tekstoj kun la mineja tradicio kaj tuttaga vivo. Vidu: Readmono 28:12; Sentencoj 10:2; Jesaja 45:3; Mateo 6: 19-21, Jakobo 5:3.

La ĉiutaga programo enhavis matenajn kaj vesperajn preĝojn, kantadon, prelegojn. La lastaj estis multspecaj. Ili respegulis la engaĝitecon de la partoprenantoj. Bedaŭrinde iom mankis 'la fadeno' de la elektita kongrestemo.


Albrecht Kronenberger montris al ni la kanttrezorojn en Adoru. La pianoakompano fare de Ernst Leuze instigis la entuziasmon same kiel Gerhard Hofmann per sia fajna bekfluto.

**Dimanĉe** alvenis la plej multaj partoprenantoj. La bongusta vespermanĝo estis tre bonvena post longa vojaĝo.

**Lunde** gvidis la KELI-prezidanto Philippe Cousson la diservon kun





La kongresejo. Fotis VP



P. Cousson kaj W. Rohloff dum la enkonduka diservo. Fotis VP

Sankta Manĝo kaj poste sekvis la oficiala malfermo. La temo de la prediko baziĝis sur Mateo 6: 19-21.




Albrecht Kronenberger

Multaj prezentadoj estis apogitaj de la komputilaj ebloj. Albrecht Kronenberger kaj Bernhard Eichkorn klarigis la uzadon de la hejmpaĝo Kristanaj



Ĉe la nuksrompila muzeo. Fotis BÅ

Fontoj (www.fontoj.net). Ĝi enhavas la melodiojn de la kantoj el Adoru kaj ankaŭ multajn aliajn kristanajn tekstojn.

La interkonan vesperon gvidis Samuel Gaillard. Ludo prezentita de Wil van Ganswijk instigis nin moviĝi.

**Marde** okazis la tuttaga ekskurso. La buso veturis al Seiffen, konata pro siaj lignaj ludiloj kaj manfaritaj kristnaskaj figuroj. Je la rando situas subĉiela muzeo kun diverstipaj domoj kaj laborejoj el la regiono. Libera tempo konvenis por iom esplori la urbeton kaj aĉeti rememoraĵojn. La orgenisto de la unika rondforma Montara Preĝejo rakontis interesajn faktojn kaj aŭdigis la instrumenton. Wolfram Rohloff lerte tradukis en Esperanton dum la tuta semajno.

La lasta parto de la vojaĝo kondukis al la muzeo de nuksrompiloj en Neuhausen.

La vespero alportis ripozon sed ne por la estraro. Atendis ilin kunsido.

La **merkreda** mateno estis dediĉita al tradukaj kaj gramatikaj problemoj. Tiaj temoj igis la aŭskultantojn reagi kaj diskuti. Posttagmeze oni regalis nin per 3 aliaj paroladoj. Oni povus dubi pri la kvanto de prelegoj dum mallonga posttagmezo.

Je la 19.30 komenciĝis koncerto en la Luterana preĝejo de Zöblitz al kiu ankaŭ la enloĝantoj estis invititaj. Orgenludis Ernst Leuze kaj kantis la soprano, Elisabeth Rohloff. La programo estis grandparte omaĝo al la nederlanda komponisto Sweelinck (1562-1621) pro la rememoro de lia 450-a naskiĝtago. Post la koncerto rakontis Wolfram pri la historio kaj la interno, interalie pri la



Paŭzo dum la duontaga ekskurso. Fotis WvG

serpenta baptokuvo el la 16- jarcento.

**Ĵaŭde** en la mateno okazis la jarkunveno. Aperas pri ĝi aliloke raporto.

La duontaga ekskurso posttagmeze altiris promenemulojn. Ĝi fariĝis aventura sperto pro la pluvego kaj malebena vojo. Vespere ni ĝuis la muzikgrupon *Grenznah* [Proksime al la Landlimo]. La tri ĉarmaj virinoj bele kaj pure kantis akompanataj de citro-ludanto kaj gitaro.

**Vendrede** ni havis kvin lekciojn pri religiaj temoj el kiuj mi mencias kelkajn. Wolfram Rohloff pritraktis Mateo 23: 32 kaj Philippe Cousson instruis pri la Heidelberga Katekismo. Gerhard Hofmann pri Levidoj 11.



Hedwig kaj Rudolf Fischer

Vespere prezentis kongresanoj siajn multflankajn talentojn inter ili Éva Farkas, kiu rememorigis nin pri iamaj kongresoj per diapozitivoj.

**Sabate** sekvis la lastaj prelegoj kies temoj havis rilatojn kun la lingvo. Wolfram Rohloff prilumigis la demandon pri la diferenco inter lingvo kaj pensado, Ed Borsboom pritraktis tri librojn eldonitajn de Internacia Esperanto Instituto en Hago.

La posttagmeza rakonto pri Jakobaj Vojoj en Hispanio de Hedwig kaj Rudolf Fischer malkaŝis la spertojn de la pilgrimado .

La kutima adiaŭa vespero, gvidita de Samuel Gaillard entuziasmigis kontribuantojn kaj aŭskultantojn. Ĝi estas iom emocia okazintaĵo. Per dankvortoj direktitaj al Wolfram Rohloff kaj Pavel Polnický substrekis la KELI-prezidanto nian aprezon. Sen ilia tre valora agado la kongreso certe ne estus sukcese okazinta. En pluraj regionaj ĵurnaloj aperis pozitivaj artikoloj.

Pro tio, ke pluraj partoprenantoj jam veturis hejmen ĉeestis malpligranda grupo dum la 2-lingva diservo en la Luterana preĝejo de Zöblitz. Wolfram gvidis, predikis kaj tradukis. Kunlaboris kongresanoj kaj ni kantis la samajn melodiojn en la germana kaj esperanta lingvoj.

Antaŭ nia forveturo ofertis la eklezianoj trinkaĵojn kaj kukojn. Plena de impresoj ni ekvojaĝis forlasintaj la Ercmontaron kaj niajn malnovajn kaj novajn amikojn.

Fotantoj: Bengt O Åradsson (BÅ),
Vaclav Pospišil (VP)
Wil van Ganswijk (WvG)

# Bildoj de la kongreso en Zöblitz



S Gaillard kaj A Landfors ĉe lignisto



S Krüger, P Chrdle kaj K H Schaeffer




E Leuze ĉe la muzikilo



W Rohloff k E Borsboom



Fischer, Krüger, Lepping, Polnický



S. Stamm kaj B Eichkorn

**Sekcio de kristanaj esperantistoj**
**de ĈEA sincere invitas Vin**

partopreni la 63-a kongreson de K E L I
**3. - 10. 8. 2013, SVITAVY, Ĉeĥio**

# A L I Ĝ I L O

Familia nomo: ..........................................................................................................

Persona nomo:..........................................................................................................

Adreso: ..........................................................................................................

Lando: ..........................................................................................................

Telefono:. ..........................................................................................................

Retadreso: ..........................................................................................................

Mi mendas ĉambron
en studenta hejmo: ☐ unu-litan ☐ du-litan ☐ tri-litan
en hotelo Garni: ☐ unu-litan ☐ du-litan

Mi estas vegetarano: ☐ JES ☐ NE

Kroma informo pri manĝado:

Mi preferas loĝi kun: ..........................................................................................

Dato: ...........................................

Subskribo: ..........................................................................................................

Organizaj informoj:

Mi estas preta gvidi ĉiutagajn preĝojn: ☐ JES ☐ NE

Mi povus prelegi pri : .........................................................................

Mi havas specialajn dezirojn: .............................................................

.............................................................................................................

Mi alveturos: ☐ trajne ☐ buse ☐ aŭtomobile

kaj alvenos proksimume:.............................................................

---

Notoj de LKK

La aliĝilon sendu al:
Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
Telefono : +420 325 615 651 E-mail: polnicky@quick.cz

La kongreson organizas KELI, sed partopreni povas ankaŭ IKUE-anoj kaj ĉiuj aliaj esperan-tistoj, kiuj volas ĝui kristanan medion en belega naturo.
**Svitavy** estas distrikta urbo surlime inter Bohemio kaj Moravio. Ĝi estas bone atingebla trajne el Praha (181 km) kaj Brno (74 km) kaj aŭtomobile (parkejo ĉe la kongresejo). En la studenta hejmo estas 3-litaj ĉambroj, kelkaj kun necesejo kaj duŝo. Vi povas esti sola aŭ du en la ĉambro, sed nur escepte, ĉar tiam ni perdas litojn, kiuj restos liberaj kaj la kapacito estas nur 64 litoj entute.

| Sumoj estas en EURoj | La aliĝo validas nur post la pago de garantia sumo ĝis 31.12.2012 | ĝis 31.3.2013 | post 1.4.2013 | Restadkosto | hotelo |
|---|---|---|---|---|---|
| Kategorio A : | 10 | 20 | 30 | 130 | 320 (370)* |
| Kategorio B : | 30 | 40 | 50 | 220 (270)* | 320 (370)* |

Kategorio A: ekssocialismaj landoj, Afriko, Sudameriko * unulita ĉambro
Kategorio B: ĉiuj aliaj landoj

- Sendoj de monbiletoj (EUR) per registrita letero al Pavel Polnický.
- Se eblas, uzu UEA-postĝirkonton aŭ pagu prefere al **ING BANK** en NL al **Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam** por konto **kelk-p de KELI**
  **BIC**: INGBNL2A **IBAN**: NL 72 INGB 0000 378 564

---

## El provizora programo:

- oficiala malfermo de la kongreso
- interkona vespero
- diservo kun sankta manĝo
- prelegoj, kantado
- koncertoj
- jarkunveno de KELI
- tuttaga busa ekskurso al historia urbo Litomyšl, naskiĝurbo de Bedřich Smetana kaj esperantista verkisto Karolo Píč
- duontaga busa ekskurso al urbeto Polička, kie nask. Bohuslav Martinů

# Protokolo de la jarkunveno de KELI

dum la kongreso en Zöblitz 2.8.2012

Partoprenis 32 membroj kaj 3 gastoj. (listo de partoprenantoj estas ĉe la sekretario).

1. La prezidanto Philippe Cousson malfermis jarkunvenon. Li legis Psalmon 133 kaj ni kantis kanton 856 el Adoru.
2. Elekto de kunprotokolantoj – elektitaj Els v. Dijk kaj Sieglinde Stamm
3. Jarkunveno akceptis programon publikigitan en Dia Regno n-ro 3/12.
4. Estis legitaj bondeziraj leteroj de IKUE kaj persona de la nova prezidanto de IKUE Giovanni Daminelli.
5. Funebra memorigo. Starante ni rememoris fraton Olavi Kantele el Finnlando.
6. Sekretaria raporto publikigita en DR estis kompletigita de Mats Landfors, sveda sekcio, K. H. Schaeffer, aalena grupo, Els v. Dijk, nederlanda kaj Hedwig Fischer, germana sekcio. Pavel Polnický legis raporton de J. Biset pri brita sekcio.
7. Kasistan raporton (ankaŭ en DR) komentis kasistino Ágnes Racz-kevy-Eötvös. Ŝi proponis malpli-grandigi la librostokon per donacoj al ekzemple afrikaj esperantistoj
8. Raporton de kaskontrolantoj legis K. H. Schaeffer. Ili trovis ĉion en bona ordo. En la pasinta jaro kontigis paralele Siegfried Krüger. La komisiono por 2013 estos K. H. Schaeffer, Norbert Südland kaj kiel anstataŭanto Marcus Holz-apfel. La kasistino estis senŝarĝi-gita.
9. Post la diskuto estis aprobitaj ĉiuj raportoj. La membroj kiuj ne pagis siajn kotizojn, ricevos en DR




La estraro dum la jarkunsido. Fotis Wil v Ganswijk

admonleteron.

10. Post la klarigo estis akceptitaj buĝetoj.
11. La redaktoro Bengt Olof Åradsson informis pri enketo farita dum la kongreso koncerne la artikoloj en Dia Regno. Li planas novan serion pri la atributoj de la apostoloj. Malnovaj numeroj de DR aperis en la interreto ĉe Kristanaj fontoj. Iu membro demandis pri la ebleco presi fotojn kolore. Dependas de la kostoj.
12. Estrarelektoj – reelektitaj estis Bengt O. Åradsson kaj Zoltán Somhegyi.
13. Kongresplanoj – venis propono de IKUE organizi venontjare ekumenan kongreson en itala Trento. Pri la ekumena centro kaj ebleco kongresi tie informis nin Stefan Lepping kaj kompletigis lian informon K. H. Schaeffer, kiu tie partoprenis Bibliajn tagojn. Ĉar ni ne havas sufiĉe da informo pri dato kaj prezoj nia jarkunveno akceptis tiun proponon kondiĉe, ke ni baldaŭ ricevos detalojn. Se tiu ekumena kongreso en Trento okazos (verŝajne pli multekosta) jarkunveno konsentas, ke estraro povas subvencii partoprenon al elektitaj membroj.
14. Proponoj kaj sugestoj ne estis.
15. La jarkunvenon fermis P. Cousson.

Protokolis sekretario
Pavel Polnický

kaj kontrolis
Els van Dijk kaj
Sieglinde Stamm.

La tradicia grupa foto de la kongresanoj




# La ekzisto de DIA REGNO

Redaktis Ed BORSBOOM, NL

Unu el la labor-branĉoj de Internacia Esperanto-Instituto en Hago, Nederlando estas la arĥivo de esperantaj gazetoj. Ĝi entenas proksimume 100 diversajn titolojn, ĉiujn menciitajn sur la hejmpaĝo de IEI (iei.nl). Pluraj el ili estas kompletaj ekde la komenco de la apero kiel ekzemple *ESPERANTO* (UEA), *HEROLDO de ESPERANTO, LA PIRATO* la rara satiraĵo de Raymond Schwartz, MONATO, EL POPOLA ĈINIO, LA GAZETO.

Ĉe multaj ni havas nur kelkajn jarkolektojn, ĉe aliaj mankas ie kaj ie numeroj. La institutanoj strebas al plenigo de tiuj lastaj serioj. En tio helpas i.a. la disponigo de materialo el esperantaj heredaĵoj kaj la volontuloj, kiuj ordigas la envenintaĵojn.

Gravan revuon en nia posedo prezentas DIA REGNO. Pro tio ke pluraj kelianoj ne precize scias pri la historio de sia propra periodaĵo, mi kompilis superrigardon pri la aperintaj kajeroj.



**Esperanto**

en la servo de La Dia regno

**Monataj raportoj**

pri la disvastiĝo de Esperanto inter la

**Kristanaj Unuiĝoj de Junaj Viroj.**

| Nro 1—2. | Februaro-Marto 1908. | Unua jaro. |
|---|---|---|
| Jarabono: 50 spesdekoj (sd) Unu numero: 5 sd. | 1) Eldonanto: P. Hübner. Mülheim a. Rhein (Germanujo) Friedr. Wilh. Strasse 66. | Oni abonu per postmandato |

1 spesmilo (sm) = 100 sd = 2 markoj = 2 ŝilingoj = 2,50 frankoj.

**Al la karaj amikoj kaj samideanoj!**

Kun multe da ĝojo kaj danko al nia Dio ni sciigas al vi, ke nun Esperanto iom post iom eniras en niajn unuiĝojn. Nia disvastiga laboro komencita per helpo de Dio, ĉiam plimultiĝas kaj jam ne estas eble, informi ĉiujn amikojn per poŝtkartoj aŭ leteroj pri la progreso de Esperanto inter niaj unuiĝoj.

Tial ni decidis, eldoni Esperantan gazeton por nia afero, esperante, ke niaj samideanoj volonte penos, kolekti kiel eble plej multajn legantojn.

Ni petas nun niajn karajn amikojn, afable kaj kiel eble plej ofte sendi al ni sciigojn pri disvastiĝo, instruo, uzo k. t. p. de Esperanto en iliaj unuiĝoj, por ke ni povas pliriĉigi niajn raportojn.

Plue ni petas, afable sciigi al ni ĉiujn adresojn de Esperantistoj en la „Kristanaj Unuiĝoj de Junaj Viroj" (K. U. J. V.), ĉar ni intencas, eldoni baldaŭe Esperantistan adresareton de nia mondligo.

**Pri la komenco.**

Jam de longa tempo inter kelkaj amikoj regis la deziro, enkonduki nian karan lingvon kiel interkomprenilon de nia mondligo. Nia mondliga sekretario, Sro. Barono W. von Starck konvinkiĝis pri la bonaj ecoj de Esperanto je la Esperantisma kon-

Aperado de DIA REGNO

- 1908 (naskiĝo) - julio/aŭg. 1914 (halto pro milito)
- 1921 - 1922 (reapero kiel parto de KRISTANA ESPERO)
- 1923 - 1924 (ĝis n-ro 2, apero memstara denove)
- 1924 - 1932 (granda paŭzo)
- 1932 (reapero) - 1941 (halto pro milito)
- 1946 (reapero provizora)
- 1947 - 2012 (regula kaj seninterrompa apero)

Redaktoroj de DIA REGNO

1908 - 1949 Paul Hübner, Germanio (kun intermitoj)
1949 - 1952 Roel van Spronsen, Nederlando
1952 - 1961 C.P. Brakké, Nederlando (Kiu keliano konas la tutan antaŭnomon?)
1961 - 1989 Jan van Keulen, Nederlando
1989 - 2004 Philippe Cousson, Francio
2005 - ĝis nun Bengt Olof Åradsson, Svedio

DIA REGNO aperis 1949 – 1999 en 12 numeroj en la jaro, ekde 2000 ĝis nun en 6 numeroj. Manko de DIA REGNO ĉe Internacia Esperanto-Instituto:

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1980 | 1, 2, 3, 10, 11 | 1999 | 4 |
| 1981 | 5, 8 | 2001 | 2 |
| 1982 | 8, 9 | 2002 | 1 |
| 1985 | 11 | 2005 | 1 |
| 1987 | 1, 2 | 2007 | 5 |

Eble iuj el la membroj de KELI ankoraŭ posedas en sia subtegmento malnovajn ekzemplerojn de DIA REGNO, kiuj mankas ĉe IEI. Ni tre ĝojas, se ili bonvolus sendi ilin al:

Els van Dijk,
Koningsmantel 4,
NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando.

Viajn poŝtkostojn IEI repagos. Koran antaŭdankon.


Kongresa numero.
No. 7–8. Julio-Augusto 1909. 2a jaro.
Dia Regno
Monata Esperanta organo
por
Kristanaj Unuigoj de Junaj Viroj. (K. U. J. V.)
Redakcio: P. HÜBNER, Mülheim a. Rhein.

Dia Regno 1909 julio - aŭgusto


DIA REGNO

Dia Regno 1951 majo


DECEMBRO 1938 NUMERO 12
DIA REGNO
Kristana Esperantista Ligo Internacia
Enkonduko de Esperanto en la internacian protestantan mision

Dia Regno 1938 decembro

# Flo Martorell ricevis la ĉi jaran FAME-premion

Informas Szilvási László

En 1988 Alois Meiners starigis la fondaĵon FAME por subteni la Esperantan kulturon, enkadre de kiu ĝi aljuĝas "Kultur-premion FAME" kun aldonita sumo de 3000 eŭroj - la plej alta premio-sumo en la Esperanta-mondo.

La ĉi-jaran premion ricevis Floréal Martorell, por siaj meritoj rilate al Esperanta muzika kulturo! La transdona ceremonio okazis en la urbo Aalen, en kadro de solena festo kun subteno de la urba administracio. La festprelegon faris konata germana esperantisto, eksperto-muzikisto Gunnar Fischer.

Sincerajn gratulojn al Floréal Martorell, kaj al la tuta teamo de la Esperanto-eldonejo Vinilkosmo pro la premio!

Ĝis nun ricevis la kulturpremion:

- Kultura Centro Esperantista kaj ĝia biblioteko C.D.E.L.I., La Chaux-de-Fonds, Svislando
- Ito Kanzi (Ludovikito), Japanio
- Profesoro Richard Schulz, Germanio
- Bruno Vogelmann, Germanio
- Heroldo de Esperanto, Italio
- Spomenka Stimec, Kroatio
- Fonto, Brazilo
- Marjorie Boulton, Britio
- William Auld, Britio
- **Adolf Burkhardt – Bernhard Eichkorn – Albrecht Kronenberger, Germanio**
- la muzikgrupo Kajto, Nederlando
- la Internacia Kultura Centro Herzberg, Germanio
- la Internacia Esperanto-Instituto Hago, Nederlando
- Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov, Rusio
- Floréal Martorell, Francio

- http://www.vinilkosmo-mp3.com/index.php?language=e - retejo de Vinilkosmo
- http://www.fame-stiftung.de/eo/kulturpremio.html - retejo de fondaĵo FAME

La 1an de julio, 2012
SUZHOU

Kara mia estro!

Saluton!

Tre ĉagrene mi aŭdis la mortinformon de mia favoranto Olavi hieraŭe.

Antaŭ 60 jaroj, mia sveda s-ino Palm Göta kaj gesinjoroj Anna Sad. ĉiam helpis kaj subtenis min (dum mi estis juna). Kaj poste, ili iris al Dio. favoranto Olavi helpis kaj gvidis min daŭre.

Por deponas miajn funebrajn sentojn, mi skribas (tra la nokte) la funebran poemon en la letero. Petu presi en via kara Dia Regno. Dumvive, mi dankas KELI-estraron (kune kun Olavi) helpi kaj zorgi min! Ĉiam mi gravuras en la memoro. eĉ la graco de la gutanta akvo, nepre reciprokas favoron dumvive!!

Ĉina Hsu Chungmu

# Funebre al Olavi Kantele

- eterne konservas la memoron

Amiko, se intime en la lando;
Najbaras ŝajne eĉ ĉe l' ĉielrando.
Se demandos pri mi en KELI gesinjoroj,
En jadkruc' glacikristalas mia kor!

Renkontiĝo kaj disiĝo malfacilas.
Vent' eosta feblas, florojcent gracilas.
Forbrulinte, ne plu larmas la kandelo;
La silkraŭp' ĝis morto emfadenon spilas.


Kandel' enkore pro forest' suferas,
Por ni ĝin verŝas larmojn ĝis tagiĝ'.
Ne tristu, ke vojaĝamikoj mankas,
Ne konas vin neniu sur la KELI-rondo?



# Donald Broadribb (1933-2012)

Honora Membro de UEA, d-ro Donald Broadribb forpasis la 13-an de oktobro. Li naskiĝis en Usono sed ekde 1974 vivis en Aŭstralio. Broadribb studis filozofion, teologion kaj lingvistikon en Usono kaj Aŭstralio kaj psikanalizon en Svislando. Li esperantistiĝis en 1946 kaj membriĝis en UEA en 1950. Li redaktis plurajn Esperanto-gazetojn: KRISTANA BULTENO en Usono en la 50-aj jaroj, NORD-AMERIKA ESPERANTO-REVUO (1959-62), BIBLIA REVUO (1964-72), LA NIGRA CIGNO (bulteno de Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio, 1980-88), kaj ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO (1989-2008). En 2008 li fondis la retrevuon MIRMEKOBO, de kiu ĝis oktobro 2012 aperis 21 numeroj. Kun G. Rust li kompilis TERMINAROn DE BIBLIAJ STUDOJ (1973). En 1967 li kunfondis ĉirkaŭ "Biblia Revuo" Internacian Asocion de Bibliistoj kaj Orientalistoj!

Broadribb estis grava tradukisto. Krom du verkoj de Platono, LA RESPUBLIKO KAJ KRATILO (la unua el kiuj gajnis la OSIEK-premion en 1995), li esperantigis ALICO EN MIRLANDO kaj TRANS LA SPEGULO de L. Carroll, LA MIRINDA SORĈISTO DE OZ (L. Frank Baum), EPOSOJ EL ANTIKVA UGARITO, 1984 (G. Orwell), kaj plurajn tekstojn el la Mortmaraj rulaĵoj de Qumran. Amaso da artikoloj kaj tradukaĵoj el lia plumo aperis en diversaj Esperanto-gazetoj ekde 1948. Li kontribuis per tradukoj ankaŭ al Aŭstralia antologio (1988). Broadribb estis membro de la Akademio de Esperanto (1972-81 kaj 1992-2001) kaj juĝanto pri prozaĵoj ĉe la Belartaj Konkursoj de UEA (ekde 1995). Rekone pro liaj meritoj Aŭstralia Esperanto-Asocio donis al li la titolon de Fratulo en 1996. En la 82-a UK en Adelajdo en 1997 li estis nomumita Honora Membro de UEA.




La Mirinda Sorĉisto de Oz

REMEMORE AL

# Nel van Iperen-de Vries

La 24-an de septembro 2012 forpasis en Utreĥto (Nederlando) bonkora esperantistino, honora membro de KELI. Ŝi atingis la altan aĝon de 98 jaroj.

La unua renkontiĝo kun Nel okazis en 1967 kiam mi lernis nian lingvon. Trafis min ŝia entuziasmo kaj afableco. Ŝi plenumis plurajn oficojn en la movado: membro de la Esperanto Ekzamena Komitato, prezidanto de la Utreĥta Esperanista Rondo (1970-1995), estrarano de KUNE (la Nederlanda KELI-sekcio) ekde 1964 kaj ties kasistino de 1983 ĝis 1995. Partoprenantoj de la KELI- kongreso de Kiljava kaj la ekumena kongreso de Klagenfurt kaj Dalfsen eble rememoras Nel kaj la edzon Dirk.

Ŝia hejmo en la Nassaustrato en Utreĥto estis ĉiam gastame malfermita por kunvenoj kaj gastoj de diversaj nacioj. Finfine malpliiĝis la korpaj fortoj kaj sekvis translokiĝo al maljunulejo. Ankaŭ tie ŝi rakontis entuziasme pri Esperanto kaj KELI .

Ni sincere kondolencas la parencojn. La mortinto ripozu en paco.

*Els van Dijk*

## La entombiga ceremonio de Nel van Iperen-de Vries

Ŝi naskiĝis la 12-an de majo 1914 kaj forpasis la 24-an de septembro 2012 en Utrecht. La entombigo okazis la 1-an de oktobro 2012 en Bilthoven. En la aŭlo de la tombejo mi ĉeestis la rememoran kunestadon. La pastorino de la maljunulejo Swellengrebel, kie Nel loĝis dum la lastaj jaroj, gvidis la solenaĵon.

Post orgenludo estis la Paska Kandelo ekbruligita kaj sekvis bonvenigaj vortoj. La forpasinto mem elektis la kantojn de la liturgio antaŭ kelkaj jaroj. Pluraj familianoj parolis pri ŝia vivo kaj menciis ke Nel estis fervora Esperantisto, membrino de la Esperanto-klubo en Utrecht. Invititaj eksterlandaj gastoj vizitis la loĝejon, ekzemple el Svedio kaj Hungario. Volonte ŝi partoprenis Esperanto-Kongresojn. Per komputilo estis prezentitaj bildoj de ŝia vivo.

La Esperanto-stelo kiu iam pendis sur la fenestro de la iama domo kuŝis nun sur la ĉerko. La temo de la prediko baziĝis sur Samuel 3,3-12, 19. Finfine oni akompanis la familion al la tombo kie ankaŭ kuŝas la edzo Dirk kaj ĵetis florojn sur la ĉerkon. Mi povis fari tion ankaŭ nome de la esperantisoj.

*Gerda Dercks*

# Matena preĝo

Sinjoro, mi laŭdas Vin,
Vi estas la mateno kaj la vespero,
la komenco kaj la fino de la tempo.
Vin mi dankas pro la ripozo dumnokta
kaj la lumo de tago nova.
Korpo kaj animo estas Viaj,
antaŭ Vi estas ĉio, kio okazas.

Sinjoro, Jesuo Kristo, Vi lumo de la mondo,
Vi estas la vojo, kiun mi iras hodiaŭ,
Vi estas la vero, kiu min gvidas,
Vi estas la vivo, kiun mi trovas.
Donu al mi Vian amon,
por ke mi retrovu Vin en la homoj.
Donu al mi paciencon kaj trankvilecon
kaj gardu min en Via amo.

Sinjoro, Vi Kreanta Spirito,
veku miajn sencojn kaj pensojn,
donu al mi fantazion kaj klarecon,
senteman konsciencon,
la ĝustan, helpan vorton
kaj la zorgeman agon,
por ke mi kreu utilon
kaj ĉi tiu tago ne estu perdita.

Sinjoro, Sankta Dio,
kion vi sendas al mi, mi akceptas,
sukceson kaj malsukceson, ĝojon kaj penon.
Mi petas Vin por ĉiuj
kiuj komencas ĉi tiun tagon kun zorgoj,
kun timo aŭ doloroj.
Akompanu nin, protektu nin, gardu nin.
Mi dankas Vin pro Via nova tago.

kontribuis Siegfried Krüger